

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Aĉono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencej.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencej aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 39. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Septembro, 1923.

MONKOLEKTO POR NIAJ JAPANAJ KUNHOMOJ.

La konsilantaro de la Aŭstralazia Esperanto-Asocio decidis esprimi la veran konsenton de la Esperantistoj de Aŭstralazio kun la suferantoj de la Japana terskuego. Letero estas ekspedita al konata Esperantisto en Kioto, kun informo ke menseado baldaŭ sekvos, kiun li povos disdoni kie ĝi estas pli urĝe bezonata. S-ro. H. Byatt, 62 Northcote Road, Armadale, Vic., prizorgas la monkollekton. Ĉiu grupo estas petata kunhelpi, kaj montri ke ĉia konsento estas ne malplenaj vortoj, sed vera, solida helpo en krizo, kiam tujaj kaj granda helpo estas urĝe necesa.

OURSELVES.

With the July issue La Suda Kruco unostentatiously entered into the fourth year of its existence. We think that this proves that the paper is appreciated and shows that it serves the useful purpose of maintaining the unity of Australian Esperantists. The continued publication of the paper has been rendered possible only by the loyalty with which the original subscribers have extended their support. Among the hundreds of beginners now receiving instruction in our various groups there should be dozens who have sufficiently progressed in the language to become readers of and subscribers to, La Suda Kruco, and we are hopeful of hearing from them

before long. A gratifying feature is that recently we have received several suggestions. This indicates a real interest in the paper. Where practicable these suggestions have been adopted and those not yet dealt with will receive consideration when we have the means of giving effect to them.

The Chronicle is admittedly a weak feature. It does not by any means reflect to the full the Esperantist activity throughout Australasia. Group secretaries and teachers have been appealed to over and over again to send a paragraph occasionally, but very few have responded. We now ask each Esperantist to consider himself or herself on the staff, and to send us news for insertion. Any interesting information, pithily presented in Esperanto, will be welcome. Typical Australian items, which would serve to advertise Australia, its capabilities and resources, would reach all corners of the earth very quickly, and would benefit Australia and also serve to further emphasise the value of Esperanto. La Suda Kruco is the product of voluntary workers, and for that reason every allowance should be made for its shortcomings, and those workers should be helped, whenever possible, and, most important of all, they should be encouraged in their labours by a steady increase of subscribers, which would enable the paper to be enlarged, and more diversified contents to be provided.

KRONIKO.

ARMADALE, V.—Nova grupo fondiĝis en Armadale, laŭnome, "La Persista Grupo." La kunvenejo estas 62 Northcote Road, Armadale, kie la membroj renkontiĝos ĉiun Merkredon, ja la oka vespere. Prezidanto estas S-ro. Byatt, sekretario F-ino Thomas, Kasisto F-ino Byatt. La grupo aliĝis al A.E.A. kun laŭdinda rapideco.

MELBURN, V.—Dro. Fred J. Williams, tre entuziasma Esperantisto, vic-prezidinto de la Sidneja kongreso, antaŭ nelonge iris al la insuloj Novaj Hebridesoj, por tie entrepreni kuraĉistajn devojn.

S-ro. A. Maurice Hyde, prezidinto de la A.E.A., post du jara deĵoro en Rabaŭl, nun ĝuas libertempon. Fine de Aŭgusto li vizitis siajn parencojn en Melbourne, kaj nun vojaĝas al Java kaj aliaj proksimaj insuloj antaŭ ol rekomenci siajn oficialajn laborojn en Decembro.

NEWCASTLE, N.S.K. — La nova grupo kiu antaŭ nelonge komenciĝis sub "Workers' Educational Association" (Laborista Eduka Asocio), kreskis al 30 membroj kaj, se oni povas ĵuĝi per la entuziasmo, fariĝos unu el la plej gravaj en Nova Sud-Kimrujo. —La grupo tre deziras ricevi malnovajn gazetojn kaj librojn.

OAKLEIGH, V.—La 30an de Aŭgusto, antaŭ la filio de la A.N.A. S-ino. Bigelow kaj S-roj. Byatt kaj Hudson parolis pri Esperanto. La ĉeestantoj tre interesiĝis kaj aĉetis diversajn lernolibrojn. Post antaŭa informo ke la necesaj lernolibroj kostus tri funtojn agrable surprizis ilin la scio, ke oni povas lerni la lingvon el libro, kiu kostas nur du ŝilingojn kaj ses penojn.

SIDNEJO, N.S.K.—La Senato de la Sidneja Universitato lastmonate donis sian oficialan aprobon permesante la starigon de Esperanta grupo inter studentoj de la universitato. Ĝis nun 16 studentoj aliĝis kaj klasoj kunvenas ĉiusemajne en unu el la lerneĉambroj sub energia gvidado de S-ro. J. N. Edmonds, konata lingvo instruisto. Tiu klaso ne estas parto de nova universitata lernprogramo, sed tute memvola lernado kaj okazas dum liberaj horoj.

"IKA" (Internacio Katolika) fondis filion ĉi tie. Lia Moŝto, Ĉefepiskopo Kelly, benis la asocion kaj D-ro. Sheehan, Kunaganta Ĉefepiskopo, prezidis

la inaŭguran kunvenon. Granda ĉeestantaro aklame akceptis Esperanton, kiel oficialan lingvon. La Sidneja "Daily Telegraph" longe raportis la protokolon.

Dum aŭgusto du intereseĝaj prelegoj okazis ĉe Sidneja Esperanto-Societo. "Naciaj humorajistoj" estis la temo, kiun S-ron. A. Feldmayr pritraktis kaj en facila maniero li rakontis humorajojn el la vivo de kelkaj pli aŭ malpli konataj humorajistoj Germanaj kaj Turkaj. —La alia parolanto estis S-ro J. N. Edmonds, instruisto de Japana lingvo ĉe gimnazio, kiu elektis la temon "Ellernante lingvon." S-ro. Edmonds (parolante angle) montris la ĝeneralan malfacilon de lingvostudentoj kaj diris, ke eĉ Esperanto ne povas esti ellernata en 10 lekcioj aŭ 4 semajnoj, escepte, eble, de eksterordinaraj personoj. Oni devas lerni kaj kompreni lingvon same kiel aliajn objektojn kaj tio nur estas ebla per tutkora studado. Li diris, ke la esperanta movado bezonas spertajn Esperantistojn kaj ĉiuj devus celi perfektigon.

AUSTRALIANOJ EKSTERLANDE.

Skribante el Genevo la 15 julion, S-ro. W. J. Drummond diris, ke ĝis tiam li faris vizitojn al Londono, Ostend, Bruges, Ghent, Bruselo, Parizo kaj Lyon. En ĉiu menciita loko li renkontis Esperantistojn kaj ĉiuj estis tre afablaj. En Genevo li havis longan interparolon kun D-ro Privat. Postlasinte Genevon S-ro. Drummond iris al Lucerne, laŭ la lago de Genevo, poste al Milano, Firenzo, Romo, Venecio, Piume, Jugoslavio kaj Nurnberg.

S-ro. Drummond faris tre sukcesan paroladon pri Aŭstralio en la halo de la Komerca Ĉambro de Lyon. Tiam da petoj estis ricevitaj, ke S-ro. Drummond timas ke li ne povos aranĝi plenumi ĉiujn.

Fraŭlino Emilie Ely, la oficiala reprezentanto de la A.E.A. por la Nurnberga kongreso, ankaŭ skribante el Genevo, raportis ke tie ŝi malsaniĝis, sed ŝi esperis esti en sufiĉa bona sanstato antaŭ la kongresa dato. Ŝi konatiĝis kun multaj Esperantistoj, kiuj estis tre helpemaj, kaj pro siaj spertoj, oni povas certigi ankoraŭfoje al la mirinda taŭgeco de Esperanto por ĉiu lingva neceso dum vojaĝo.

RECENZOJ.

Bukedo kolekto de literaturaĵoj originalaj kaj tradukitaj de diversnaciaj aŭtoroj. Revizita de Zanoni. T. & H. Jung, Horrem bei Koln, Germanujo. Ĉi tiu libreto estas represo de naŭ mallongaj historietoj kiuj unue aperis en "Esperanto Triumfonta." Ili estas nek pli bonaj, nek pli malbonaj, ol la kutima ĵurnala felieto, sed tamen, ili estas interesaj pro ilia diversnacieco. Kvankam la temo estas tre neversajna, la rakonto de dana verkisto St. St. Blicher, tradukita de H. J. Bulthuis, L.K., (aŭtoro de "La Idoj de Orfeo"), meritas la lokon de honoro, kiun oni donis al ĝi metinte ĝin je la komenco de la libro.—[C. W. B.]

Kio estas la Biblio, de pastro H. Lenk, Herrnhut. 50 paĝoj; tre interesaj kaj gravaj klarigoj pri la deveno de la Sankta Biblio. Prezo 0,40 sv. Fr. 6 pencoj.

Katalogo de la anonima Societo "Centra Esperanto Librejo," 2 Bankastraat, Hago. La provizo de libroj estas pli granda ol 6000 verkoj, kaj oni celas la vendadon de libroj, je moderaĵ prezoj. Kiel atestilo ke Esperanto iam estas profitodona la societo citas ke ĝia akciuloj ricevis dividendojn de 6½ pro cento en 1919, de 7 pro cento en 1920, kaj 6 pro cento en 1921.

Samouczek języka Esperanto (Lernolibro por poloj, tria eldono), de Prof. Leopold Kronenberg Bydgoszcz, Polujo.

La kompilinto de ĉi tiu lernolibro de longe estas ĵurnalista kaj kondukanto de skriba kurso de Esperanto. La libro estas plena, bone aranĝita kaj kredeble estas tute sufiĉa, por instrui Esperanton al la Poloj. La fakto ke du eldonoj elĉerpigis estas certigilo ke la libro ricevis bonan akcepton.—[C. W. B.]

Kristana Esperanta Kantareto. 11 multekonataj kristanaj kantoj kun melodinoj, kunmetitaj per la redakcio de Dia Regno Prezo: 0,40 sv. Fr.; 6 pencoj (angle); malbonvalutaj landoj demandu pro la prezo. Havebla de P. Hubner, Quedinburg, Bergstrasse, Germanujo.

JOHANO LA BRAVA, originalo de Aleksandro Petofi, tradukita en Esperanton de K. de Kalocsay. Eldon-

ita de "Literatura Mondo," Budapest. La poemo estas traduko de hungara fabelo, kaj estas tre interesa de tiu vidpunkto. Pri la temo mem oni ne povas diri multon. Same kiel la plej multaj el Hungarujo kaj Polujo, la fabelo finiĝis iom malĝoje, sed en tiu ĉi okazo la malĝojo estas moderigita, ĉar la heroo havas la feliĉon atingi Felandon, kie li renkontas la heronon.

La jenaj stancoj trovataj en la finaj ĉapitroj, montras plej bone la kapablecon de la tradukinto, kiu fariĝis eminenta en Hungarujo, pro lia nova verko "Mondo kaj Koro."—

Johano la Brava ĵus atingis Felandon kaj renkontas sian amatan Ilno.

En Feland' pri vintro oni eĉ ne scias,
Tie pomp' eterna de l'printemp' radias.

Suno ne mallevas, levas sin alterne,
Ruĝ' aŭrora tremas sur ĉiel' eterne. . .

Meze de Felando kuŝis blua lago,
Al' ĝi li alvenis dum malĝoja vago.
Rozon, kiun de la kara tomb' li ŝiris
Prenis li de l'brusto kaj li al ĝi diris.

—Cindroj de l'amata! Mia sol-trezoro!
Montru vojon kaj mi sekvos vin, ho floro!

Kaj ĝin en la ondojn ĵetis li malĝoje,
Mem li, por ĝin sekvi, estis jam survoje.

Sed kion li vidis! Ho, miraklo kia!
Jen la rozo ŝanĝis sin je Ilno lia!
Kuris li en ondojn kvazaŭ en frenezo
Kaj li ŝin elsavis el la laga mezo. . .

Bela estis Ilno! tuj al ŝi rapidis
La feinoj kaj ŝin ĝojmirante vidis,
Kaj el ŝi akrame tuj reĝinon fariŝ,
Dum Johanon feoj sia reĝ' deklaris.

La poemo estas verkita en la trohean ritmo, Aleksandra verso, kiu ĉiam estas iom unutona; sed por variigi ĝin la tradukinto iomete ŝanĝis la ritmon de tempo al tempo. Estas dube ĉu tiu ĉi estas plibonigo, ĉar ĝi iom malfaciligas la legadon.

Elizio estas uzita tro ofte, kiu malhelpas la gracion, facilan fluon de la versoj; tamen troviĝas en la verko multo por laŭdi, spite de la mankoj.—[V.C.]

LA KRESKO DE CANBERRA, CEFURBO DE AUSTRALIO.

S-ro. P. G. Stewart, Ministro por Entreprenejoj kaj Fervojoj en la Aŭstralia Federacia Parlamento elŝovelis le unuan herbeteraĵon en preparo por la fundamentoj de la nova Parlamentejo en Canberra, la 28 Aŭgusto.

S-ro. Stewart, dum memoriga parolado, diris ke la konstruo de la Federacia Parlamentejo montras tre gravan punkton en la historio de la konstruo de la urbo. Rilate al Canberra oni sekvas precizan planon, kiun oni faris antaŭ ol permesi enloĝadon.

La fundamentaj ingenieraj aferoj, ekzemple vojoj, akvoprovizo, kloaka sistemo kaj elektra povo, jam nun estas en certa grado de kompleteco kaj nun ni atingas alian punkton—tiu de la komenco de la starigo de la oficialaj konstruaĵoj. Antaŭ la milito la Federala urbo estis populare konsiderita kiel urbo en kiu troviĝus impozantaj kaj monumentaj publikaj konstruaĵoj kaj arkitekturaj belecoj indaj de komparo kun tiuj de aliaj landoj. La ŝanĝitaj ekonomiaj kondiĉoj faris plan konsideron necesa, kaj kvankam, la konstruo de Canberra donas unikan okazon, ne estas ebla la plano kiu premus la nunan generacion per aldonita financa ŝarĝo. Feliĉe ekzistas kontentiga alternativo. La nuna plano por la konstruo de Canberra ne alvizaĝas monumentan, sed ĝardenan urbon. La vojo estos ankoraŭ ne barita kiam la okazo sin prezentos. La Parlamentejo nun konstruata estos provizora, sed en neniu senco estos malestimebla. Kvankam la desegno estas simpla, pro la ekonomiaj postuloj, la domo el brikoj estos solida kaj sufiĉege granda. La arkitekturaj trajtoj ankaŭ estos agrablaj. La desegno enhavas ĝardenajn boskojn kaj estas en harmonio kun la koncepto de Canberra kiel ĝardeno urbo. La nuna generacio, do, ĝuos la avantaĝojn de kompleta konstruaĵo, kiu plenigos ĉiujn postulojn necesajn por la plenumo de ĉiuj leĝdonaj funkcioj, dum fakte monumenta konstruaĵo, se komencita, prezentus en la daŭro de multaj jaroj, nekompletan ŝajnon arkitekture, kaj, intertempe, estus malpli komforta. Oni intencas kompletigi la domon kiel eble plej rapide kaj ankaŭ inviti konkurajn desegnojn por la Administraciaj Oficejoj post nelonge. La registaro volas ke la malfermo de la prok-

sima parlamento havu lokon en Canberra.

Elstaranta trajto en la regiono estas le Preĝejo de Sankta Johano la Baptisto, unu el la originalaĵoj de la distrikto, kies historio komencis en la 1848 jaro. Ĉi tiu preĝejo, kaj ĝia imponanta turpinto starante inter altaj popoloj estas rememoraĵo de la fortikaj pioniroj el Anglujo, kiuj trapenetris la montajn pasejojn de ĉi tiu malebena kaj pitoreska regiono. La interno de la preĝejo, kun ĝiaj galerio por la servuloj de la mastra klaso, siaj gigantaj traboj el cedro, alta altero kaj malnovmoda pipa orgeno, faras neforgeseblan impreson sur la vizitanto. La preĝejo estas malgranda porcio de maljuna Anglujo metita en nova lando. Ĝi elradias atmosferon de pieco kaj sentimento. Kristanoj de ĉiuj kredoj trovas lastan restejon en ĝiaj malgranda tombejo. Ĉi tiu malnova trajto estas kunigata kun alia institucio, nome la parlamento de popolo. La malnova preĝejo estas simbola de la fruaj barakoj de kolonizado. La nova parlamentejo malfermas alian ĉapitron de nacia evoluo.

Kiel cito de la eblecoj atingotaj en Aŭstralio, estas oportune diri ke S-ro. Stewart, kiam li estis juna knabo, estis stratvendisto de ĵurnaloj. Per laboro kaj persisto li gajnis monon sufiĉan por sia edukado, fariĝis farmisto kaj poste parlamentano, kie lia kapablo baldaŭ gajnis por li lokon en la Ministerio.

LA SENFADENA DISSENDO DE ESPERANTO.

S-ro. E. Drezen parolis 25 minutojn enrusa lingvo pri Esperanto. Lia parolado estas aŭskultita en 300 diversaj urboj. Dum 30 minutoj li parolis Esperantlingve por tuta Eŭropo. Multaj gazetoj jam aperigis artikolojn pri tiu radio-lekcio.

Prof. Hetzell en Philadelphia radio-paroladis la 24 februaro. "Esperanto en Radio-komunikado."

LA KONSILANTARO DE A.E.A.

La balotado inter la membroj de la Melburna sekcio donis la poziciojn al la sekvantaj, laŭ ordo de prefero. S-ino. Bigelow, S-roj Hudson, Cohen, Ballard, Byatt, Redfern kaj Tilbury. Gratulojn al S-ino. Bigelow, ke la nura ino inter la konsilantaro havas la honoron okupi la unuan lokon.

EL LA "RUBAJAT" DE OMAR HAJAM.

La verko de ĉi tiu Persa poeto vinta en la 11-a jarcento, kvankam supraj ĝi montras ŝajne pure materialistan filozofion, havas por multaj homoj pensojn de profunda spirita valoro.

(Laŭ la Angla traduko de Edvard Fitzgerald.)

XLII.

Kaj tra hotela pord' en tagofino malhele, ŝtele, venis anĝelino,
portante vazon sur la ŝultro, kaj,
min petis trinki . . . trinko estis vino!

XLIII.

La Vino per logiko absolute rebatas la sektaron plenrefute—
subtila alhemio, kiu ŝanĝas
la plumbon de la viv' al oro tute.

XLIV.

La glora Mamud, forta, nevenkita,
al tuta miskredanta ar' bandita
da ombroj, timoj, en anim' svarmantaj
dispel-detruas per la glav' sorĉita.

XLV.

Ho, lasu disputadon al saĝuloj,
kaj meze de l' tumulto, en anguloj
kvietaj, moku ni la mondbatalon;
ni ridu ĝin; ĝi faras nin nur nuloj!

LXVII.

Ha, min mortantan benu per la Vino,
per Vin' la korpon lavu, en la fino;
en mortotuk' el vina foliaro
kuŝigu min en dolĉa ĝarden-sino,

LXVIII.

ke mia cindro per la bonodoro
dolĉe-insida, kiel juna floro,
surprizu ĉiun fidelulon, kiu
min pasos, kaj lin tenu je la koro.

LXIX.

Kaj vere, mia amo al idolo
min lasis sen kredito, sen konsolo,
dronigis la honoron en pokalo,
kaj vendis la bonfamon por obolo.

LXX.

Ho, ofte, ofte, ĵuris mi la penton. . .
sed ĉu mi sobre pelis for la tenton?
Printempo tiam, roz'-en-mano, venis,
en pecojn ŝiris eluzitan penton.

LXXI.

Kulpa la Vin' je multa perfidaĵo,
je rabo de l' honora la vestaĵo;
sed diru. . . kion la vinist' aĉetas
duone karan kiel la vendaĵo?

LXXII.

Kun rozo, ve! printempo flugas for!
De l' libro de junec' la bonodor'
pereas. Najtingalo ĵus kantinte
el kie flugis, kien? . . . Vana plor'!

LXXIII.

Amata, se ni povus en konspiro
ĉi-universon, idon de deliro,
ekkapti kaj frakasi, ĉu ni ne
refarus ĝin laŭ nia kordezino?

LXXIV.

Ha, lun' de mia ravo, ĉiam hela,
relevas sin la glora lun' ĉiela;
ŝi ofte min reserĉos tie ĉi
(sed vane, vane!) en ĝardeno bela.

LXXV.

Kaj kiam vi, en brilpieda paso
de lok' al loko inter la amaso
da gastoj sur la herbo, ĝoje venos
al mia loko . . . nur malplena glaso!
Tradukis A. Delsudo.

LA DUMKONGRESA EKZAMENO.

Oni anoncis kiel sekvas—
Gajnis unua-gradajn Atestojn,—
Mary Winters, John Soboleff, Adelaide E. Hughes, Wilhelm Hamann, James Widdowson, Mrs. A. A. Scammell, Eric E. Jolliffe.
Gajnis Diplomojn:—Richard J. Dodd, Gerald D. Kvarnstrom, Norman G. Grant.

Gratulojn al la sukcesintoj.

LA PROPONO DISSENDI POST-KARTOJN.

Okaze de la propono kiun faris korespondanto al Melburna ĵurnalo por reklami Aŭstralion kaj memorigi la venontan maltigon de nia poŝta tarifo la Melburna propaganda komitato sugestis al la aŭtoritatuloj, ke ili eldonu poŝtkartojn kun klarigaj tekstoj en Esperanto. La direktoro de propagando por la Enmigranta Departemento respondis ke nune lia departemento nur celis allogi Anglojn sed se estonte ĝi volus trafi alilandulojn li ne forgesos la proponon.

La komitato ankaŭ metis la proponon antaŭ la poŝtaj ĉefuloj.

"GEGO" REVENAS.

S-ro G. Gordon ("Gego"), kiu iris al Eŭropo en 1922, kaj, kun S-ro. Percy Hudson, reprezentis Aŭstralion ĉe la XIVa kongreso, vojaĝis en Eŭropo, post vintra resto en sudo de Francujo, kaj kredeble ĉestis la Nurnbergan Kongreson. Li komencis la vojaĝon al Aŭstralio le 31aŭ de Aŭgusto per la kuriera sipo "Khyber," do, oni esperos bonvenigi lin malfrue en oktobro.

ESPERANTO EN RUSUJO.

S-ro. Valdemar Langlet, kiu antaŭ pli ol 30 jaroj estis unu el la gvidantoj de la esperanta movado Sveda kaj konata al la tutmonda esperantistaro paroladis antaŭ esperantista grupo en Stockholm, pri siaj esperantaj spertoj dum vojaĝo en Ruslando, kiun li ĵus faris. Inter alia, li diris, Du interesaj spertoj estas la jenaj: 1., ke homo, kiu unufoje posedis la lingvon, memoras ĝin kaj povas ĝin facile uzi ankaŭ post pli ol 20 jaroj, kvankam ne parolinte, ne skribinte, eĉ leginte preskaŭ nenun vorton dum la tuta tempo—bona argumento por nia lingvo, se oni memoras, ke ĉiu alia lingvo-konado, ne uzita, malaperas sufiĉe rapide. 2, la lingvo Esperanto estas en la nuna Rusujo sufiĉe bone konata; mi trafis dum mallonga estado en Moskvo multajn personojn, kiuj tute posedis Esperanton kaj parolis ĝin egale flue kiel sian gepatran lingvon.

ESPERANTO VIVAS.

Plauen, 27 Aprilo.—Hodiaŭ mi estis devigita atendi en la ĉi tiea stacidomo ĉirkaŭ du horojn survoje al la ĉefa landlimo. Mi alparolis policiston sur la perono, demandante informon pri la loka Esp. movado kaj ĉu li scias la adreson de la UEA-delegito. Imagu mian agrablan surprizon, kiam mi ricevis respondon al mia germanlingva demando en flua Esperanto.—Enirante la vagonaron mi estis demandata de knabo vendanta orangojn kaj ĉokoladon kaj ekvidinta mian stelon: "Ĉu vi estas Esperantisto?" Mi preskaŭ pensis, ke mi enfalis en la kongresan urbon. Li sukcesis vendi al mi ĉokoladon citante la prezojn en Esperanto. Ni interŝanĝis adresojn kaj adiaŭis unu la alian post agrabla interparolo.—Kaj la mondo volas scii, ĉu Esperanto estas jam bone disvastigita.

J. D. Applebaum, el Liverpool (E. T.)

FILATELIO.

Rusujo. Novaj postmarkoj: 3 rubl. (soldato) rozkolora, 4 r. (laboristo) bruna, 5 r. (vilaĝano) helblua, 10 r. (soldato) ardeza. Blanka papero, dentumita, 14½ × 15. La ciferoj ŝajnas malgrandaj, sed ili signifas orajn rublojn; laŭ moneldono 1923 unu tiel nomita "ora" rublo (fakte ĝi estas ankaŭ nur papera) estas unu miliono da sov-etrubloj de 1921. Simpla letero enlanda kostas nun 6,500,000 rublojn de 1921, rekomendita letero duoblon, rekom. aerpoŝtletero kostas 18,000,000.

Polujo. Denove elvenis en la malnova aglotipo 300 (helverda), 400, 500, 1000 kaj 2000 mk. Pulpagomarkoj novaj de sama tipo kaj koloro kiel la lasta eldono, sed pli grandaj (24 × 19½) 200, 500 kaj 1000 mk. kun plej diversa dentumo.

Aŭstralazio. Pulpagaj markoj ½d. ĝis 1s nun aperas kun la nova filigrano.

Nauru. La 1½d. Angla estas surpresita "Nauru" por uzo tie.

LA BELEGOJ DE SVISUJO.

La Societo de la Berna Alpfervojoj dissendis la sekvantaŭ ĉirkuleron.

—Pro la praktika uzo de Esperanto kaj servoj, kiujn la Universala Esperanto-Asocio en Genevo povas peri, ni decidis la provan eldonon de nia propagandilo kaj sendi ĝin al la delegitoj de U. E. A. kaj gravaj Esperanto-gazetoj.

Al ĉi-tiu ĉirkulero ni aldonas kelkajn ekzemplerojn de nia unua Esperantedaktita propagandilo petante ĉiujn delegitojn recenzi ĝin en sia gazetaro faka aŭ loka.

Ni speciale atentigas, ke la plua eldono de niaj propagandiloj en Esperanto dependos de la sperto farita per Esperanto.

Por paroladoj pri nia mirinda kaj nekomparebla Berna Oberland ni estas pretaj pruntedoni belegajn lumbildojn al ĉiuj en-kaj eksterlandaj grupoj. Gvidlibrojn germanajn aŭ francajn ni senpagig liveros.

[Interesuloj ricevos ekzempleron de la gvidilo se ili petos ĝin de la bibliotekisto de la Melburna sekcio de la A. E. A.]

HERE AND THERE.

Sixty eminent citizens of Czecho Slovakia have joined the Honorary Committee of the National Esperanto Association. Among them are three

Ministers of State, 20 university professors and high-school teachers, authors, artists, journalists, members of the Academy of Arts and Sciences, Deputies and Senators.

The tenth Hungarian Labourist Esperanto Group has been formed in Rakospalota, a working-class suburb of Budapest.

The Seventh Brazilian Esperanto Congress, in Rio de Janeiro, from 19th to 24th April, was a great success. The opening was attended by Senor Alves, Minister for Internal Affairs, and representatives of the President of Brazil, Ministers of States and Associations. The attendance was about 1000. The "Jornal do Commercio," the chief paper in Brazil, during the seven days of the Congress, dedicated many columns to reports of the proceedings, and published the speeches. The Vice-president of the Republic telegraphed to the Congress, congratulating it on its great success. The chief commercial associations had representatives at the Congress.

The Congress recommended the formation of a Commercial Esperanto Association, advised the workers to learn Esperanto, and supported the appeal for the Zamenhof memorial.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, apr., majo, jun.; **Austra Esperanto Raporto**, n-ro 4; **Belga Esperantisto**, mar.-apr.; **Esperanta Finnlando**, mar.-majo; **Esperantista Junularo**, nova formato, majo-junio, julio-aŭgusto; **Esperanto Triumfonta**, n-roj. 135-146; **France-Esperanto**, jun.-jul.; **Itala Esperanta Revuo**, apr.-majo, jun., jul.; **Katolika Mondo**, majo, jun.-jul.; **Internacia Stenografisto** ĉiudumona gazeto: Ricevebla nur per aligo al la asocio. Direktoro, S-ro. P. Flageul, 9 Bd. Voltaire, Issy, Seine, Francujo, N-ro. 1. jul.; **Kristana Espero**, mar.-apr.; **La Fervojisto**, Dumona fakrevuo, Lobeska ul. 12, Pezen, N-ro. 1, jul.; **La Espero**, apr., majo; **La Interligilo de l'P.T.T.**, majo; **La Progreso**, majo-jun.; **La Semisto**, mar.-majo; **La Unuigita Tuthomaro**, mar.-apr., majo-jun.; **La Verda Ombro**, majo; **Literaturo**, apr.-jun.; **Pola Esperantisto**, majo-jun.; **Sennacieca Revuo**, jun., julio; **Skandinava Esperantisto**, majo.

Multaj gazetoj, al kiuj ni sendas nian gazeton, ne interŝangas aŭ sendas nur

malregule. Ni petas ilian bonvolan atenton.

PAGITAJ ANONCOJ. FILIGITAJ GRUPOJ.

Australazia Esperanto-Asocio. Prezidanto, S-ro. A. R. Cohen. Sekretario, S-ro. G. Redfern. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth Street Post Office, Melbourne. Renkontejoj, (Melburna sekcio), Hardware Club Chambers, 350 Little Collins Street, vendrede vespere, je la oka horo.

Berwick Esperanta Grupo. Renkontejoj kaj poŝta adreso ĉe F-ino. P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, ĵaŭde vespere, je la oka horo.

Hobarta Esperanta Grupo, renkontejoj Eaton Bray lernejo Davey St. ĉiun duan mardon 7-30 vespere. Prezidantino F-ino. C. M. Hannaford, Sekretario kaj poŝta adreso F-ino. A. Beckett, 177 Davey St., Hobart.

Iru Antauen Grupo. Prezidantino S-ino. E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro. J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd. Oakleigh. Renkontejoj 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere, je la oka horo.

La Carnegie Esperanta Grupo. Prezidanto S-ro. Blundy. Sekretariino, F-ino. L. M. Irwin. Renkontejoj kaj poŝta adreso, "Kirkcaldy," 10 Woorayl St., Murrumbreena. (du pordoj de la Carnegie Cinemteatro) Ĵaŭde vespere, je la oka horo.

Nigra Cigno Grupo. Prezidanto, S-ro. C. Casey, Sekretariino, F-ino. F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard St., Victoria Park, W.A. Renkontejoj, vespere je la oka horo, James St. School, komencantoj marde; progresintoj, 9 Pier St. ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale. Prezidanto S-ro. H. Byatt, Sekretariino, F-ino. I. Thomas, Renkontejoj kaj poŝta adreso, 62 Northcote Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

GARANTIA FUNDO.

L. W. Saw, 8/-; C. J. Crichton, 4/-; G. Meyer, 5/-; A. Klein, 6/6; F. T. Simon, £2; A. M. Carter, 5/6; L. A. Miller, 3/-; M. C. Trundle, 5/-; J. A. Hodges, 2/-; I. Majstrovich, 5/-; H. Ballantyne, 2/6; L. M. Glynn, 5/6.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 31a aŭgusto ni ricevis la jenajn sumojn:—A. M. Hopton, 4/6, ĝis majo '24; A. Ryan, 4/6, ĝis majo '24;

L. W. Saw, 4/6, ĝis julio '24; I. Leaby, 10/-, ĝis julio '23; C. J. Crichton, 13/6 ĝis junio '24; A. Klein, 13/6, ĝis majo, '25; H. V. Tilbury, 4/6, ĝis majo '24; W. J. Scott, 4/6, ĝis julio '24; A. H. Slade, 10/-, ĝis majo '25; A. M. Carter, 4/6, ĝis junio '24; L. A. Miller, 4/6, ĝis junio '24; J. Dobrich, 5/-, ĝis junio '24; J. A. Hodges, 5/-, ĝis junio '24; K. Takahashi, 5/-, ĝis aŭgusto '23; L. Irwin, 4/6, ĝis julio '24; G. H. Janzen, 5/-, ĝis majo '24; O. Caine, 4/6, ĝis majo '24; L. Steitz, 4/6, ĝis julio '24; T. Casey, 4/6, ĝis majo '24; T. J. Marsich, 3/-, ĝis julio '24; A. P. G. Marsich, 5/-, ĝis julio '24; J. E. Bonwick, 4/6, ĝis julio '24; L. M. Glynn, 4/6, ĝis aŭgusto '24; G. Zumaglini, 4/6, ĝis julio '24; A. Madarasz, 4/6, ĝis julio '24; kontantaj vendoj, 13/8.

ĈIU ESPERANTISTO ĈU MALPROKSIMA, ĈU PROKSIMA AL THE CHOCOLATE BOWL.

povas mendi niajn altgradajn. ĈOKOLADOJN PER POŬTO. Ok unca ladskatolo, plenigita per diversaj ĉokoladoj, taŭge protektitaj kontraŭ difekto per varmo, k.e., kostas 3s, (aldonu 6 p. en Viktorio kaj 8d. ekstere, por poŝtelspezoj). Ni ankaŭ liveras ĉokl-ladojn en kartonoj je 3s 6d ĝis 22s 6d.

THE CHOCOLATE BOWL, 18 Centreway, Collins Street, Melbourne.

PHILLIP ISLAND The Ideal Tourist Resort. 6 hours from Melbourne by boat and rail.

"Redcliffs," Newhaven.

Accommodation for 50 Guests.
First Class Table.

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

Mr. E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

Hall's Book Store 264 CHAPEL STREET — PRAHRAN —

'Phone: Windsor 6081.

(Opposite Town Hall.)

Books and Music bought at your home. Libraries Valued.
Specialist in Secondhand School and College Books.
Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

BONAJ DENTOJ

BONA SANO
ONA ODORA SPIRO
ONA RIDO
ONA ASPEKTO

Ĉu vi posedas ĉi tiujn aŭ male?

Ĉiu leganto estas rekomendata al S-ro. E. Hilson por dentistaj servoj ĉe angulo de Glenferrie kaj Barkers Rds., Glenferrie.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

Printed for the Proprietors, The Australasian Esperanto Association, Hardware Club Chambers, Little Collins Street, Melbourne.
by The Imperial Press, 395 Elizabeth Street, Melbourne.